

N.Tiĥonov

# Vamberi

Hajfo  
2014

Tradukis A.Kerbel

# Vamberi

N. Tiĥonov.  
(1896 — 1979)

## Ĉapitro unua

### 1

Tio estis eta lama juda knabo. Lia nomo estis Herman Vamberi. La familio loĝis en provinca hungara urbeto.

La urbon ĉirkaŭis marĉoj, kaj mizero frapis je ĉiujn fenestrojn kaj pordojn de la domo. Por ne morti pro malsato labori devis ĉiuj: kaj la adoltoj, kaj la etuloj.

Laboron donis la marĉoj. En ili loĝis longaj kaj magraj hirudoj. Tiuj ĉi etaj monstroj estis tre bezonataj tiam. Oni metis hirudojn sur malsanulojn, kaj ili elsuĉis la malsanan sangon. Oni volonte aĉetis ilin en apotekoj. Ili estis bezonataj grandkvante. Familio de Vamberi vendis hirudojn, kaj tiamaniere vivtenis sin.

Ĉiumatene Vamberi kaj liaj gefratoj kolektiĝis ĉe la granda tablo, sur kiu svarmis la hirudoj.

La knabo dividis ilin laŭ longeco kaj dikeco, purigis de muko, kaj banis en freŝa akvo. Dividinte, baninte kaj dismetinte la hirudojn en tolan sakojn, la infanoj lavis la manojn, kaj iris manĝi.

La patrino metis sur la tablon grandan poton kun varmaj bongustaj terpomoj.

– Kaj kio ankoraŭ estos, panjo? – demandis la infanoj.

– Formanĝu tion, kaj estiel dua plado estos ankaŭ terpomoj, – respondis la patrino. – Hodiaŭ ili estas multaj.

Sed ne ĉiam ŝi respondis tiel. Iam okazis ke eĉ ne peco da pano, eĉ ne unu terpomo estis en la domo.

Enrigardi la kuirejon estis senutile. La forno estis malvarma. Tiam la infanoj kuris el la domo sur urban neuzitan terenon.

Tie, sur ĉifitaj herboj, inter oblikvaj arbustoj kaj rubamasoj interpuŝiĝis plej liberaj kaj ĉifonvestaj homoj: ciganoj kun grandegaj butonoj kunigantaj iliajn vestaĵojn, almozuloj, senlaboraj metiistoj, kaj simple trampo.

Brokantistoj vendis siajn trovaĵojn: botelojn, rompitaĵojn, lampojn, kombilojn. Senlaboraj cirkaj aktoroj glutis flamantan stupon, kaj turniĝis rade. Ciganinoj divenadis per la kartoj, kaj dancis, sonorante per la vastaj zonoj el kupraj ringoj. En kestoj de gurdistoj saltadis verdaj papagoj, kaj petis sukeron. Infanoj

ridegis, kaj incitis ilin. Sur la neuzita tereno estis premiĝe pro la homoj.

Nudpieda Vamberi, saltante per sia lambastono, trapuŝiĝis inter ili, kaj petis ĉe tiu ĉi tramparo ion por manĝi. Oni donis kun rido aŭ moko. Oni ĵetis al li pecojn da pano, restaĵojn da kolbaso, platkukojn.

Foje lin alvenis magra maljunulo-invalido, grizhara kaj unupieda. Ili eksidis sur malmolan flavan ŝtonon. Kaj la knabeto, kaj la maljunulo estis vestitaj ĉifone, kaj ambaŭ estis kripluloj. Iliaj okuloj renkontiĝis.

– Nu kio, frato, – demandis la maljunulo – kiel vi intencas vivteni vin? Ja de juneco mem vi sur unu piedo saltadas. Kio do vi volas ekesti?

– Mi ofte venas ĉi tien, – respondis la knabo, – ĉi tie estas multe da homoj, kaj ĉiuj ili parolas diversmaniere. Kaj multaj parolas tiel ke mi ne komprenas ilin. Mi volas koni ĉiujn lingvojn, kaj kompreni ĉiujn, kion ajn ili parolu.

La invalido deŝoviĝis de li pro la miro:

– Ha! Rigardu la etulon: li volas koni ĉiujn lingvojn. Tio estas ne malbone!

La maljunulo ektusis, kaj leviĝis, balancante la kapon.

## 2

Vespere Vamberi denove lavis la hirudojn, tenante ilin per la du fingroj, kaj poste ŝovante ilin en la sakojn. La infanoj dormis kuŝante sur

la planko. Sub la ĉifona itkovrilo ili kunpremiĝis por varmiĝi. Preskaŭ ĉiun nokton iu el ili vekiĝis kaj kriis:

– Hirudo, hirudo!

Ĉiuj bruis, serĉis lumon, – aperis flameto, kaj lumigis piedon aŭ brakon, sur kiu alokiĝis hirudo, forkurinta el la sako. La fuĝinton, aŭ tri-  
opon-kvaropon da ili oni kaptis, kaj denove en-  
sakigis.

...Apud-urbetaj kampoj ekestis grizaj, anseroj ne plaŭdis jam en la flakoj, sed gakis ĉe la pordegoj; arboj ekestis malsanaj kaj maldikaj – venis aŭtuno.

Oni kondukis **na**<sup>1</sup> Vamberi en lernejon, kaj li sidis kune kun aliaj knaboj, kaj lernis literon post litero. Antaŭnokte la patrino metis la lernilojn sub lian kusenon.

– Tio bezonatas, Herman, – diris ŝi, – por ke scioj mem iru tra la kuseno en vian kapon.

Vamberi lernis kun tia ardo kaj ĝojo, kvazaŭ ĉe li estis kvar manoj por skribi, kaj du kapoj por memorfiksi.

Sed la malriĉeco, kiu frapis la fenestrojn, eniris jam la domon.

Sur la tegmenoj kuŝis neĝo, sed en la forno

---

**1. na**: akuzativiga prepozicio. Utilas por konservi rekoneblon de propraj nomoj. Komparu: a) «Ĉu vi konas Ĉeĥovon?». b) «Ĉu vi konas **na** Ĉeĥov?». Propono de sinjoro G.F.Mak-Kink.

ne estis brulaĵo. La knabo kuris en la lernejon, enŝovinte la manojn en la poŝojn, varmigante ilin per varma terpomo, prunteprenita de la najbaroj.

Fratino de Vamberi eklaboris estiel servantino ĉe maljuna oficist-edzino, kiu loĝis en alia flanko de la urbeto.

La patrino kondukis na Vamberi al sia konatino. Tio estis tajloristino. Ŝi devis instrui lin kudri.

Vamberi sidis en malkomforta ĉambro, superŝutita per tranĉaĵoj da ŝtofoj, kaj plena per klakado de tondiloj, kaj susurado de disŝirataj ŝtofoj.

La kudrilo pikis liajn manojn, kaj la fadeno malobee forkuris. La lama gambo ne permesis al li moviĝi libere, kaj la manoj ne scipovis tranĉi ĝuste.

Oni mokis lin, kaj batis la manojn per la ŝtofmezurilo. Li ploris nokte, kaj eltiris el la angulo la lernolibrojn. Sed la lernejo estis malproksima. Dum festotagoj li kuris al la patrino, kaj plendis. Sed hejme sidis la fratoj, magraj kiel leporoj, kaj tremis pro malvarmo, kaj la patrino diris al li:

– Toleru ankoraŭ iom, kara mia, nur ĝis la printempo, tiam ni vidos.

Kaj printempe Vamberi metis la tondilon, la kudrilon, kaj diris al la tajloristino:

– Mi ne kudros plu. Mi veturas lerni.

La rufa tajloristino ellasis, pro la mirego, la fingroingon kaj la kuseneton kun la pingloj, sed la knabo leviĝis kaj foriris.

### 3

Grandaj fortaj bovoj kaj ĉevaloj veturigis sur longaj vojoj ĉarojn da fojno, hejtlignon, karbon kaj pajlon.

Longe veturis Vamberi kun la patrino tra malaltaj malriĉaj vilaĝetoj, boskoj kaj arbaroj, herbokampoj kaj riveroj, ĝis venis al bariero de urbo Tiska, ĉe piedo de arbarkovritaj vilaj montoj.

Malhelaj volboj de lernejo, kiu apartenis al monaĥoj *pietistoj* englutis na Vamberi.

La patrino, antaŭ ol veturigi na Vamberi en tiun ĉi lernejon, eltenis grandan batalon kontraŭ siaj konatoj.

– Li konas biblion, – diris ili, – en biblio estas ĉio. Por kio instrui al li tion kio forestas en ĝi? Tio nur pereigos la knabon. Pli bone li estu ŝuisto. Tio estas riĉa metio.

Sed ŝi insistis:

– Al mi estas malfacile separiĝi de li. Al mi estas tre malfacile fordoni lin al fremdaj homoj, sed mia filo havas bonan kapon. Por tiu ĉi kapo biblio ne sufiĉas. Do lernu li ĉion kion scias homoj.

Kaj Vamberi lernis en la monaĥeja lernejo.

Unua jaro de la lernado pasis kiel vento tra

boskon: neatendite kaj rapide. La latino sonoris en oreloj de la knabo de mateno ĝis vespero, frosto sur strato pinĉis lian nazon, sed sata tagmanĝo estis malofta gasto de lia stomako. Nokte li sonĝis ke vagadas en sovaĝaj landoj, kaj parolas nekonatajn al homoj lingvojn. Li vekiĝis ŝvit-kovrita, kaj saltleviĝis. Dormis li kie sukcesis: ĉe diversaj bonfaruloj sur sakoj en antaŭĉambro, aŭ ie post forno en kuirejo.

Tamen kiam dum la unua ferio li ekvidis salikojn de sia urbeto, li solene montris al ili sian kapablec-atestilon, sur kiu per oraj literoj estis skribita lia nomo, malvolvinte ĝin tiel, ke vidu la tuta neuzita tereno.

– Per oro, ĉu vi komprenas, tute per oro, rigardu, – fanfaronis la patrino, montrante la atestilon al la najbarinoj.

Kaj ĉiuj miris. Tiel eta, kaj tiel saĝa!

Ŝia patrino koro bolis pro fiero. Sed Vamberi diris:

– Tio ankoraŭ ne estas multe, panjo. Mi devas scii ĉion, ĉion...

Kun unuaj strioj de septembraj pluvoj lambastono de Vamberi denove ekfrapis en koridoroj de la monaĥeja lernejo.

Dika nova instruisto alvokis lin, ĉirkaŭrigardis de la kapo ĝis la piedoj, kaj poste malrespekte demandis:

– Ĉu vi estas judo, Vamberi?

– Jes, – respondis la knabo, rigardante liajn



okulojn.

– Diru al mi, Moŝele, por kio vi lernas? Ĉu ne estos pli bone se vi estu buĉisto, kaj vendu viandon?

Nomo de Vamberi ne estis Moŝele, kaj li ekflamis, sed tuj ekmemoris tondilojn kaj kudrilojn de la tajlorino, malsatajn fratetojn, kadukan kliniĝintan ilian dometon, la patrinon kun larmoplenaj okuloj, kaj noktojn, dediĉitajn al libroj.

– Instruisto, – respondis li, – mi estas almoza kaj eta. Mi obeos vin kiel patron. Sed mi ne volas esti viandisto.

La monaĥo **smajletis**<sup>2</sup> kaj diris:

– Bone, mi kredas, iru en la klasĉambron.

#### 4

Tiu ĉi jaro falis sur la knabon kiel nigra nuboj. Konatuloj, ĉe kiuj li ricevis tagmanĝon kaj noktejon, disveturis el la urbo. Poŝo de Vamberi ne sciis kio estas mono.

Knabaĉoj sur strato kaptis lin je la lambastono, submetis la piedon, por ke li falu, ĵetis ŝtonojn en lian dorson, kriis:

– Difektulo, timulo, kriplulo!

Li iris kaj tremis pro la furiozo.

---

**2. smajlo:** la vorto utilas por indiki ĝoj-esprimon mienan, **sononan**, kontraste al rido, kiu estas ĝoj-esprimilo **sona:** smajlo, smajleto, smajlego; rido, rideto, ridego. (Propono).

Ĝibulo-ĉaptajloro donis al li angulon en sia ĉambreto. Sed estis nenio por manĝi. Tiam li petis laboron en la lernejo. Oni diris al li:

Venu matene, ĝis la lecionoj, purigi botojn kaj vestojn de la instruistoj.

Apenaŭ la vintra suno komencis tuŝi la fenestrojn, Vamberi sidis jam ĉe forno en granda lerneja koridoro kun boto en la mano. Per unu okulo li observis la broson, kurantan sur la boto, kaj per la alia rigardis en la libron.

La forno ekestis lia amiko: ĝi varmigis kaj trankviligis lin. Krom tio en ĝin oni ĉiam povas ĵeti kelkajn terpomojn, hazarde konserviĝintajn de hieraŭ.

Krom la forno liaj fidelaj amikoj estis libroj. Legante li forgesis la malsaton.

Foje, dum printempo, la lernantoj ludis kaj petolis en la korto. Folioj de pomarboj flugis renkonte al ili. Paseroj saltis sur la barilo. La gajo puŝis manojn kaj piedojn de la knaboj.

– Hej, Vamberi, – ekscitis unu el ili, – kuru ni, nu, kuru: kiu estas pli rapida!

– Ni tuj malgajnos, – kriis aliaj, – li havas tri gambojn, li tuj devancos nin!

Vamberi paliĝis pro la kolero, kaj saltleviĝis. Kaj li ekkuris kune kun ĉiuj aliaj. Sed ili tuj devancis lin kaj, kuniĝinte en alia flanko de la korto montris al li langojn.

Li staris sola, anhelanta pro la streĉo. La knabaĉoj ridis. Tiam li turniĝis, kaj ekiris for de

la lernejo, kaj de la turmentantoj.

En tiu ĉi urbo estis sola loko kien li venis plori, kiam estis malfacile al li. Tio estis tombo de lia patro. Tien li venis ankaŭ nun. Ĉe la tombo li ĉirkaŭrigardis sin. Disŝirita jako kovris liajn ŝultrojn, la lambastono vaste truigis ĝin. El unu el la botoj elŝoviĝis la piedfingroj. Post tiu ĉi pririgardo sur lia eta frunto aperis faltoj.

– Ha malbenita, – diris li sulkgigante la frunton, kaj ŝirante la lambastonon el sub la brako, – ĉu longe vi faros min ridindaĵo? Nun ni vidos kiu estas pli forta, mi aŭ vi. Patro, patro, estu vi atestanto!

Kaj Vamberi plenforte frapis la lambastonon je la arbo, kreskanta ĉe la tombo. La lambastono rompiĝis kaj falis.

Apogante sin je bastono, paŝante kun doloro, Vamberi venis hejmen, kaj kolektis siajn librojn. Poste li volvis ilin en la litkovrilon. Tio estis ĉio kion li havis.

– Kien vi? – demandis la ĉaptajloro.

– Mi foriras, – diris li, – ĉi tie mi havas jam nenion por lerni. Mi iros pluen.

## 5

Antikva kaj morna urbo Presburg enlasis na Vamberi en siajn stratojn, malvarmajn kiel kavernoj.

Li longe iris de domo al domo, kaj ŝajnis al li ke la domoj deturniĝas, kaj la butikoj ludas

kaŝ-ludon. Tiel neatendite elsaltis antaŭ li fenestroj, post kiuj kuŝis kolbasoj, porkfemuroj, dolĉaj kukoj kaj bombonoj. Homoj preterkuris, sed neniu volis alrigardi lin. Neniu interesiĝis pri la lama knabo. Li estis fremda en tiu ĉi granda kaj morna urbo.

Vamberi haltis ĉe unu angulo. Super li balanciĝis elpendaĵo «Tagmanĝoj». Li eniris. Homo kun blua cikatro sur la mentono demandis kion li deziras.

– Mi volas manĝi, – diris Vamberi.

– Ĉi tie manĝas nur kiuj povas pripagi la formanĝiton, – respondis la mastro, – sed kio vi estas?

– Mi alveturis por lerni, sed mi povas ankaŭ instrui...

– Tiel do, – diris la mastro, – ĉe mi estas filo-nenitaŭgulo, kiu bezonas helpon.

– Bone, – diris Vamberi, – mi estas preta. Mi povas montri mian atestilon.

Kaj li montris ĝin.

Vamberi ricevis ĉe sinjoro Levi – tio estis nomo de la manĝej-mastro – lernanton, kaj duonon de faldebla lito.

Nutraĵojn li devis akiri memstare. Li sidis kun libro en angulo de la manĝejo, kaj observis la manĝulojn. Tio estis malriĉaj kaj modestaj homoj, samaj al li. La maldensan supon kaj malmolan viandon ili pripagis per kupraj moneroj. Vamberi prenis restaĵojn de la manĝaĵoj.

Iam oni etendis al li ankaŭ kompletan pecon. Poste li revenis en la angulon, kaj malfermis gramatikon de la franca. Li jam konis lingvojn: latinan, germanan, hungaran, judan.

Nun lia pasio estis la franca. Vagante sur la stratoj li alparolis france ĉiujn: laktistinon, horloĝiston-germanon, hundojn, sidantajn ĉe pordoj.

Ĉe li estis sovaĝa akĉento, kaj honesta persisto. Lia lernanto brilis per plena profaneco. Dum pala vespero, kiam Levi, kalkulinte la enspezojn, venis ĉambron de Vamberi, la knabo senvestiĝis por enlitiĝi.

– Atendu, – diris Levi, – mia filo diris ke ĉe vi aperis ruĝaj makuletoj sur la haŭto. Kio estas tio?

– Tio, verŝajne, estas febro, ne pli.

– Nu-nu, diris Levi, – turniĝu vi al la lumo. Hej, sed vi, junuleto, devos malaperi de ĉi-tie. Tiajn mi ne bezonas. Eblas ke vi infektos ĉiujn familianojn.

Vamberi leviĝis, sentante ke lian gorĝon kaptas sufokiĝo.

– Ne gravas, nun ni kvitiĝu. Por tri tagmanĝoj, kiujn vi ŝuldas al mi, vi povas ne pagi: mi lasu ĉe mi vian kusenon kaj litkovrilon. Kaj nun iru, mi ne tenas vin.

Vamberi iradis sur bulvaroj kaj interstratejoj: li estis netuŝebla, do povis frapi neniun pordon, aperi antaŭ neniu homo. Fremda kaj

morna urbo ĉirkaŭis lin.

Tiam li eksidis sur benkon en izolita angulo de strato. Sed ankaŭ ĉi tie ekaŭdiĝis paŝoj de nokta gardisto. La knabo engrimpis sub la benkon, kaj ekkuŝis premiĝe.

– Ne gravas, – diris li al si, – tenu vin, Vamberi!

Kaj li laŭmemore ripetis latinajn kaj francajn versaĵojn, ĝis endormiĝis.

## 6

Matene li venis al monaĥeja malsanulejo, kaj frapis la feran pordon. Oni enlasis lin, kaj kuŝigis sur malmolan knaran liton. La librojn li ne fordonis. Li metis ilin sub la kusenon, kaj nur tiam trankviliĝis.

La fera pordo ellasis lin nur post du semajnoj. Sur la strato al li venis maljunulo, magra kiel najlo, kun pecoj da blankaj haregoj sur la vangoj. Li aŭdis ke Vamberi konversacias kun pluvtubo france, kaj demandis:

– Ĉu vi volas labori, knabo?

– Certe!

Vamberi eĉ eksaltis sur unu piedo.

– Tial iru kun mi.

Kaj la maljunulo, kiu okupiĝis per pruntedono de mono, venigis lin en sian loĝejon. Tio estis malvarma malalta ĉambro kun granda kofro kaj du nigraj ŝrankoj. Flanke de ĝi troviĝis antaŭĉambro, kie kuŝis restaĵoj de tapiŝo, kaj

malplenaj boteloj. Tio estis ĉio.

– Kion vi scias? – ekzamine demandis la maljunulo.

– Mi konas kvin lingvojn.

– Tio ne koncernas min. Kiom aĝa vi estas?

– Mi estas dek kvar jarojn aĝa.

– Nu, diru ion germane.

Vamberi diris.

– Kaj nun ion latine.

Vamberi diris.

– Vi, ŝajne, estas ne tute stulta, – diris la maljunulo kun smajlo. – Do aŭskultu: mi estas maljuna, kaj al mi estas malfacile prepari la tagmanĝon kaj balai la ĉambron. Krom tio oni povas prirabi min, ĉar mi ne tenas hundon. Se vi zorgos pri mi, kaj gardos la loĝejon, tiu ĉi tapiŝo estas en via dispono.

Kaj per gesto de sultano, donacanta provincon al la gasto, li montris al Vamberi restaĵojn de tapiŝo en angulo de la antaŭĉambro. – Krom tio iu ajn nutraĵo estas al vi garantiita.

– Bone, – konsentis Vamberi, – mi servos al vi estiel servisto kaj hundo.

Sed iam la maljunulo lasis post si eĉ ne peceton sur la telero, kaj Vamberi venĝis al li per samo. Li forgesis streĉi lian horloĝon, ordigi la ĉambron, kaj dormis nokte tiel, ke oni povus cent-foje preterporti lian mastron tien kaj reen, sed Vamberi ne vekiĝus.

Venis jaro 1848. Muroj de trankvila Presburg ekstrems pro tondrobruo de kanonoj. Hungario ekribelis kontraŭ subpremantoj-aŭstroj. Flamo de la milito saltis de kamparanaj ĥatoj sur tegmentojn de kasteloj, kaj sur murojn de fortikejoj. Vieno detronigis la imperiestron. Studentoj kaj laboristoj fortikigis la urbon. La bataloj ruliĝadis flanke. Hungaraj revoluciuloj kunigis taĉmentojn.

Sed la lukto ne estis egalforta. Komenciĝis ekzekutoj. Sur la placoj pendis kadavroj, kaj krakado de tamburoj obtuzigis kriegojn de ruinigitaj familioj.

Vamberi malamis perforton. Li kuradis sur la stratoj, kaj per ĉiuj lingvoj insult-nomis aŭstrojn ekzekutistoj. Tiam lin komencis ĉasi la polico.

Vamberi devis fuĝi el Presburg.

En kampo ĉe Danubo li renkontis kelkajn hungarajn soldatojn, saviĝintajn de kaptiteco. Ili estis kovritaj per polvo, kaj malvenko legeblis sur iliaj vizaĝoj.

– Ĉio finiĝis, – diris ili, – ekkuŝu ni kaj mortu. Pereu nia libero!

Tiam leviĝis unu maljuna paŝtisto, kaj elk-naris al ili per voĉo, ŝanceliĝanta pro la maljuneco:

– Atendu, infanoj! Ĉiam, kiam trafas nin malfeliĉo, helpe al ni venas antikvaj hungaroj el Azio: ja ni estas iliaj fratoj; estu certaj, ankaŭ



nun ili ne forgesos nin.

Tio estis revelacio, kiu trafis na Vamberi. Li ĉiam interesiĝis pri Oriento. Li ĉiam sonĝis dezertojn kaj palmojn. Eble ĝuste tie li trovos multon da lingvoj kaj gentoj? Tie li lernos kompreni parolanton de iu ajn lingvo. Tie li trovos tiujn ĉi antikvajn hungarojn el Azio. Kaj li foriris skuita.

Kiam steloj ekstaris super lia kapo, li eksidis sur rando de ĉevoja defluaĵo, kaj ĵuris ke neniam plu li eniru iun ajn lernejon.

La sorto enpelis lin en Budapeŝton. Tiam ĝi nomiĝis ankoraŭ simple Peŝto.

## 8

Plej malpura kaj brua kafejo en Peŝto estas kafejo Orĉi. Tie kolektiĝas riĉaj kamparanoj, venintaj el provinco, kaj farmistoj. Tie staris aparta benko. Sur tiu benko, kiel sklavo, sidadis instruistoj, atendante iun forveturan dungon.

Multfoje sidis Vamberi sur tiu ĉi benko, multfoje li foriris de ĝi, kaj revenis denove. Iam ĉe li, okaze, estis mono. Tiam venis spirripozo. Li aĉetis al si uzitan pantalonon kaj, unu-dufoje, vizitis teatron.

Lerni li ĉesis eĉ ne por minuto. Li lernis lingvojn tage kaj nokte, en kampo, en remizo – ĉie kie oni povis malfermi libron kaj meti paperon. Li lernis po cent vortoj tage. Estante memlernanto li mispronocis la vortojn, kaj devis

relerni ilin. Li relernis du, tri fojoj.

Li legis verkojn de Puŝkin ruse, de Andersen – dane, de Dante – itale, de Servantes (Cervantes) – hispane.

Pro tiu ĉi lia pacienco ninio estis malfacila al li. Vortoj de diversaj lingvoj eniris lian kapon, kvazaŭ ludante. Li distriĝis per ilia bunteco kaj muziko. Li vidis ilin same kiel oni vidas pentraĵojn aŭ statuojn. Ili saltis antaŭ li, kaj ĉiu el ili signifis ion novan, ankoraŭ nekonatan.

Se li sukcesis ricevi por nelonge ĉambron, li ĉirkaŭpendigis en ĝi afiŝojn, sur kiuj li skribis koncize turke aŭ perse, por ke neniu scipovu legi: «Laboru, ĉiam laboru, estu persista – hon-tu!» Li mem donis taskojn al si kaj, se ne plenumis ilin ĝustatempe, lasis sin sen tagmanĝo.

Sed vivi estis pli kaj pli malfacile. Homoj ĉirkaŭ li loĝis en profunda, senelira mizero. Li decidis veturi en Orienton.

Mono ne ŝatis lin. Li sukcesis akiri angulon en Vieno, sur strato Tri Tamburoj, kie li vivis per pano kaj akvo, kaj magriĝis kiel katido. La loĝeja mastrino degnis lin. Iam ŝi venis al li, staris kun la manoj, kunigitaj malantaŭe, kaj per trankvilaj ŝafinaj okuloj rigardis lin.

– Kiam vi staros sur propraj piedoj, Vamberi? – demandis ŝi.

– Mi jam staras sur ili, – respondis li, – kaj nenio povas forigi min de ili.

Li elmemoris sian rompitan lambastonon,

kaj smajlis.

– Kaj kio estas tio? – esploris ŝi, enrigardante kajeron kun multegaj notoj en la kvadratetoj.

– Ĉiutage, – kara frau Ŝenfild, mi notas ĉion kion mi devas fari. Se mi ne faros dum la monato ĉion kion mi devas fari, la unuan de sekvonta monato mi deklaras al mi riproĉon.

– Vi estas stranga homo, Vamberi, – diris la hejmmastrino, kaj foriris, perpleksita.

Kaj denove vagadis Vamberi ĉie, kolektante groŝojn por vivi. Tempo pasis.

Foje, printempe, li venis al frau Ŝenfild. Ŝi ĝojis vidi lin, kaj volis regali lin per kafo, sed li rifuzis.

– Ĉu vi rapidas, Vamberi? – demandis ŝi. – Eble alveturis via patrino?

– Ŝi jam delonge mortis, frau Ŝenfild.

– Tiam, eble, vi rapidas al via fianĉino, – demandis ŝi kun smajlo.

– Ne, – respondis Vamberi, – mi veturas en Turkion, en Konstantinopol.

## Ĉapitro dua

### 1

Konstantinopol disvastiĝis kiel ega multkolora tendaro. Sur la altaĵetoj leviĝis moskeoj, similaj al tendoj. Blankaj minaretoj elstaris kiel lancoj.

La stratoj estis plenaj per henoj de ŝarĝbestoj. Ili estis tiel multaj, ke ŝajnis ke la tuta lando elmigras ien.

Apud dikaj orizitaj homoj loĝis nudaj malpurharaj almozuloj, kovritaj per cikatroj kaj vundoj. Ĉe piedoj de pasantoj fumis ardkarbujoj.

Preteriris soldatoj, ruĝaj, kiel kankroj, kaj bluaj, kiel pavoĵoj. Palacoj de la sultano estis izolitaj de ĉiuj per orizitaj kradoj. Sur verda akvo de Bosporo kuris, devancante unu la alian, pintpruaj boatoj. Sub iliaj remiloj en la klara akvo ludis mirindaj fiŝoj. Frapoj de hufoj, krioj de vendistoj, salutoj kaj insultoj surdigis novulon.

En eta malvarmeta kafejo sidis grekoj, turkoj, araboj kaj persoj.

Sur la podion leviĝis magra brunhaŭta lama homo. Ekregis silento. Estis neaŭdebla eĉ susuro de transdonitaj nargileoj kaj tasoĵoj.

La homo kante, kun gorĝaj akĉentoj deklamis pecojn el «Aŝik-Garib» («Enamiĝinta alilandano»).

La aŭskultantoj elkrietis pro la miro kaj ravo.

– Kiu estas tio? – demandis ili la mastron. – Kiu?

Kaj tiam mastro de la kafejo diris kun smajlo:

– Tio estas unu hungaro, li nur nun venis na

Istanbul, kaj jam parolas nian lingvon kiel efendi. Tio estas ne homo sed miraklo.

Vamperi **pe-is**<sup>3</sup> la deklamadon. Oni prezentis al li kebabon kaj rostit-fumaĵitan viandon.

Vamperi formanĝis, kaj foriris en najbaran kafejon. Li vivis kiel lama brunhaŭta birdo, fluganta de unu strato en alian, enspezante sian panon per kantado.

Poste li iris al hungaro Pespeki, sia amiko, en duonruinigitan dometon sur neloĝata tereno. Ili havis, por ambaŭ, unu difektitan divanon.

– Unu duono estas via, – proponis al li Pespeki, – dua – mia. Tio nomiĝas lukso de Konstantinopol.

– Sed ĉi tie estas tre malvarme, – diris Vamperi, – ĉu vi havas iun malnovan ĉifonaĵon?

Pespeki kun malgaja smajlo eltiris el la angulo grandan polvan standardon.

– Kovru vi vin per tio. Eblas ke tio varmigis vin. Sub tiu ĉi standardo ni batalis por libero de Hungario... Mi havas nenion alian.

Sed la standardo, varmiginta korojn, jam ne varmigis. Ĝi jam ekestis nur simpla peco de teksaĵo.

Kun unuaj radioj de suno Vamperi saltleviĝis, kaj iris en la urbon. Ĉi tie antaŭ li troviĝis Oriento, kaj li estis bezonata al tiu Oriento.

---

**3. pe-**: Prefikso **pe** utilas por indiki kompletan plenumon, realigon, efektivigon de la ago: konstruis **pe**-konstruis; kuiris **pe**-kuiris; kuracis **pe**-kuracis. Propono.

Famo pri alilandano, parolanta la turkan pli bone ol turko, traflugis la urbon. Oni serĉis konatiĝon kun li. Oficistoj kaj paŝaoj vokis na Vamberi al si por lerni de li lingvojn de Eŭropo.

Pasis kvar jaroj. Ŝajnas ke rado de lia sorto abrupte turniĝis. Dum tiu ĉi tempo el magra juna modesta homo Vamberi aliiĝis je forta sata turko. Kun li konversaciis verkistoj kaj ministroj. Midĥat-paŝa, ĉiopova bofrato de la sultano, rezonis kun li pri falo de islamo, pri intrigoj de francoj kaj angloj, pri historio de Turkio. Pro lia kono de turka lingvo kaj turka vivmaniero li donis al li nomon Reŝad-efendi, kio signifas «fidela».

– Kial vi ne volas dungiĝi al ni? – oni demandis lin.

– Ĉu post dek-jara lukto kontraŭ malsato kaj malvarmo, post pe-lerno de deko da lingvoj mi ekestu kabineta burokrato? Ne, mi ne povas akcepti servon ĉe la sultano: mi servas al homaro. Kun ĉiu ĉapitro pri Turkio mi enskribas ĉapitron en historion de homaro. Mi kutimiĝis kuradi, kaj pro sidado ĉe mi ŝvelas la piedoj. Krom tio mi ankoraŭ ne vidis Orienton...

Turkoj balancis la kapojn, kaj diris ke li estas pli ruza ol *ŝajtan* (diablo).

## 2

Foje li iris sur bordo de Bosporo tra alta

verda bosko. Sub la arboj sidis kaduka turko kiu en unu mano premis pipon da opio, kaj en la alia tenis tason da kafo, svingante ĝin en la aero por malvarmigi. Malantaŭ la arboj kaŝiĝis strataj knabaĉoj, kiuj observis lin kun ridego.

La turko, pro la opio, venis al plena nekompreneo. La knaboj kaŝe proksimiĝis al li, enigis en la tason longajn pajlerojn, kaj elsuĉis la kafon.

La viva skeleto enrigardis la tason, evidentiĝis ke ĝi estas malplena kaj, opiniante ke li jam eltrinkis, kriis al la servanto:

– *Kafeĝi, doldur* (alverŝu ankoraŭ iom)!

Oni alverŝis, kaj la buboj denove elsuĉis per la pajleroj la kafon.

Kaj Vamberi komprenis ke tuta Turkio estas tia. Narkotita per malklaraj venenoj de la pasinteco, ĝi dormas kaj ne vidas kiu anstataŭ ĝi trinkas ĝian kafon.

Li ekmalgajis. Li pririgardis mense tutan Istanbul. Li vidis dekojn da riĉuloj, ĉe piedoj de kiuj vivaĉis miloj da malriĉuloj. Mizero kaj sklaveco regis na Istanbul. Taso da kafo aŭ pipo da opio – kaj la tago jam pasis.

Iu diris ĉe lia orelo araban proverbon:

– Ĉiuj malfeliĉoj en vivo – pro la stomako...

Antaŭ li staris vila homo en stria turbano. Aroj da rozarioj ĉirkaŭvolvis lian kolon, kaj la okuloj brilis kiel pecoj da kupro.

– Kio vi estas? – demandis lin Vamberi.

– Mi estas derviŝo, efendi, – respondis li, – mi estis en Buĥara, Samarkand, Meŝĥed kaj Kut. Mi estis ĉie kie kuŝas ombro de profeta burnuso. Tie, kie neniam paŝis piedo de malfidelulo.

Kaj li preteriris, ripetante la araban proverbon:

– Ĉiuj malfeliĉoj en vivo – pro la stomako...  
Vamberi longe ne enlitiĝis ĉi-nokte.

– Do mi estos tie, – diris li al si, – mi estos tie kie ne paŝis piedo de eŭropano. Kontraŭ tuta islamo kaj ĉiuj derviŝoj mi venos en tiujn lokojn, kaj rigardos, por scii kio estas tio.

Post monato vaporŝipo «Progreso» veturigis na Vamberi en Trapezund, urbo ĉe Nigra maro, de kie oni povas per karavana vojo atingi Persion.

### 3

Vamberi elŝipiĝis en Trapezund. Li trairis landon de kurdoj, kie altstaturaj sovaĝuloj, almozaj kaj kuraĝaj, fanfaronas pri siaj ĉevaloj kaj armiloj. Atakante karavanon ili pafis de la ĉevalo tiel trafe, ke povis forpafi butonon, ne tuŝante la rajdanton.

Vamberi traveturis flavan Tavriz, sur bazaroj de kiu brue paroladas kvar mondopartoj, preterveturis bluan lagon Urumia, urbon Kazvin, similan de malproksime al edziĝfesta ĉokolada torto, kaj proksimiĝis al Teheran.



Li sentis konsterniĝon. Li opiniis ke Oriento estas surtera paradizo, kie sub palmoj loĝas belaj kaj gajaj popoloj, sed ĉi tie antaŭ li kuŝis aŭ sala dezerto, aŭ deserto sen salo. Ruinoj de urboj kaj kanaloj, difektitaj kaj neglektitaj, similis tombejojn. Turoj kaj fortikaĵoj staraĉis kiel ĉaĝrenaj aldoniĵoj al la rokoj.

Perso, inter kiuj li troviĝis tiutempe, ĉiam superĵetis lin per insultoj, ĉar li aspektigis sin turko. Ili estis ŝijaistoj, kaj al turkoj-sunaistoj sentis netolereblan malamon.

Eĉ sur lian azenon, estiel sunaistan beston, falis frapoj de vipoj. Apud Vamberi konstante iris malica fanatikulo en astrakana ĉapo, longa robo kaj verdaj ŝuoj, kaj kriis, kvazaŭ oni pagis al li per oro por tiu ĉi kriado:

– Do vi opinias, efendi, ke Omar, tiu ĉi fava hundaĉo, tiu ĉi diabla animalo, tiu ĉi fetora serpentaĉo ne agis perfide? Respondu, tuj respondu!

Vamberi povus diri al la perso: «Amiko mia, mi ne estas interesata pri tio, vi povas trankviligi...»

Sed tiu respondo egalus al milit-deklaro. Oni murdus lin, opiniante lin diablo. Ĉirkaŭe estis malkleraj kaj furiozaj homoj. Multaj el ili neniam vidis eŭropanon.

Do Vamberi faris seriozan mienon, kaj disputis kiel sunaisto, disputis kiel turko, disputis ĝis la sepa ŝvito. Li pe-lernis en Istanbul ĉiujn

artifikojn de mulaoj, kaj estis malfacile suspekti lin trompanto. Tio okazis sur ĉiu haltejo, sur ĉiu noktejo.

Fine ili ekvidis vicojn da poploj, kaj fruktajn ĝardenojn. Inter ili blankiĝis io granda kaj senforma. Tio estis Teheran.

Vamberi sunbruniĝis kaj hardiĝis. Oni nomis lin Reŝad-efendi. Tuta lia antaŭa vivo, ŝajne, estis dehakita de li. Ĉe li aperis novaj amikoj.

Dum belegaj bluaj noktoj de Teheran li drinkis kun ili, deklamis al ili versojn de Omar Ĥajam kaj de Hafiz. Ruĝa vino – *hullari* – malhelis en iliaj pokaloj. Senĉese sonis tostoj. Oni elpensis ilin surloke, momente.

– Mi drinkas je savanto de karavanoj! – kriis iu.

Kaj ĉiuj drinkis je savanto de karavanoj.

– Mi drinkas je *Binat-ul-Naŝŝa* (Filino de Kadavro)! – kriis alia.

Kaj ĉiuj drinkis je Granda kaj Malgranda Ursino, nomata en Persio Filino de Kadavro. Kaj tiel ili drinkis tutan nokton sub blua ĉielo de Persio.

Poste kriis strigoj, kaj antaŭmatene bojis hundoj. La steloj paliĝis kaj foriris de la ĉielo. Tiam ili iris dormi.

#### 4

Vamberi venis al sia konatulo – turka am-

basadoro en Teheran, al Hajdar-efendi, kaj malvolvis antaŭ li mapon.

– Kion mia amiko volas diri? – La turko ekrigardis demande.

Li estis homo libera, sen antaŭjuĝoj, kaj estimis na Vamberi.

– Iom da atento, sinjoro, – diris Vamberi, – rigardu: jen ĉi tie troviĝas Buĥara, kaj ĉi tie Ĥiva – tie, kie tiriĝas granda akva linio, rivero nomata *Oksun* aŭ Amu-Darja. Tien iros Vamberi, kun via permeso.

– Ne ŝercu, tiu permeso ne okazos.

– Tiam Vamberi iros sen la permeso.

– Neniam! kriis la amiko. De tie ne revenas eŭropanoj. Ĉu vi volas esti dishakita je pecoj aŭ pendigita je la piedoj! Kien vi iros? Vi lamas. Por trafi tien oni devas iri centmejlajn da vojo, kaj kiu vojo! Sabloj, montoj, kavegoj... Toleri malvarmon kaj malsaton. Ĉe vi ne sufiĉos fortoj.

– Ho, – diris Vamberi, – en Persio mi havas nenion por fari. Mi ne estas arkeologo – ruinoj ne interesas min. Kio koncernas malsaton, mi malsatis dek kvin jaroj, tio ne estas malmulte. Koncerne eltenemon, mi sursaltas ĉevalon dum plena rapideco, kaj grimpas sur kamelon kiel akrobato. Komunumo da vaguloj kaj rabistoj nur distros min.

– Sed sola vi faros eĉ ne tri paŝojn.

– Sed kiu diris al vi ke mi estos sola? Mi iros

kun miaj amikoj.

– Kiu estas ili? Ĉu mi povas ilin vidi?

– Por tio sufiĉas nur veni al la fenestro.

Hajdar-efendi rigardis kaj tremetis. En korto de la ambasadejo sidis pilgrimoj, revenantaj el Mekko en Centran Azion. Konsumitaj, kovritaj per koto kaj polvo, kiel pellacigitaj bestoj, kun rozarioj kaj irbastonoj sidis derviŝoj.

– Ĉu vi, Vamberi, iros kun ili, kun tiuj ĉi friponoj kaj bigotoj? Mi ne permesos tion.

– Ve, sinjoro, mi jam decidis.

– Mi komprenas nenion, Vamberi. Kion vi bezonas en Buĥara? Kial vi serĉas malbonon kaj nur malbonon?

– Kara efendi, mi estas adepto de scienco. Proverbo diras: ne eniru domon kun malbona pordo. Mi volas eniri. Mi volas vidi na Buĥara. Eblas ke mi devas eluzi mian vivon ĝuste por atingi na Buĥara. Tio estas persisto de sciencisto, nenio haltos min. Kial mi iros kun derviŝoj? Mi parolas la turkan pli bone ol iu ajn turko. Profesio de tiuj homoj estas mensogo. Mi scias ke simplajn homojn oni trompas samsukcese kaj en Azio kaj en Eŭropo. Tiuj ĉi homoj vendas preĝojn kaj rozariojn, kaj akvon el Mekko. Ili prenas tiun akvon el ajna puto. Tial estas facile rilati kun ili. Sed se mi pereos, – la perdo estos ne tro granda. Mia patrolando estas malproksima, familion mi ne havas. Tial ne tenu min, amiko mia.

Poste na Vamberi vizitetis doktoro Bimzenŝtejn. Li similis platan fiŝon, al kiu oni subite alfiksis piedojn. Li spiris malfacile, kaj iom balbutis.

– Vamberi, mi aŭdis ke vi iras na Buĥara, ĉu?

– Jes, mi iras.

– Aŭskultu, oldulo, majoro Konolli estis tie...

– Kio do?

– Lia kapo pendas sur murdentoj de emirato. Stoddart iris sur lia vojo. Oni trapikis lin per lanco kiel folion da kartono.

– Estis ankaŭ aliaj, doktoro, estis ankaŭ pli feliĉaj ol tiuj.

– Jes, estis: Blokvil sidis antaŭ mi same kiel sidas vi, kaj rakontis kiel turkmenoj bruligis liajn kalkanojn, kaj rompis liajn brakojn. Vajsbern, – forta anglo, – ridis ĉe mi pri la danĝeroj. Demandu venton, Vamberi, demandu nokton, demandu vojnon, Vamberi, – kie estas Vajsbern? Neniu respondos, ĉar neniu scias kio okazis pri li.

– Mi estas pli modesta ol ili, doktoro. Mi neniam serĉis famon de martiro. Mi trauros nerimarkita, kiel pulo sur derviŝo.

– Nerimarkita, Vamberi? Cent okuloj observos vin tage kaj nokte. Dum vi manĝos, dormos, simulos preĝadon, – cent kontrolantoj staros post via dorso. Je ĉiu via paŝo vi stumb-

los spionon. En stepo, monaĥejo, bazaro, sur strato, sufiĉas ke iu homo diru: «Tio estas *fren-gi*» (eŭropano), – kaj vi pereos. Vi ne povos defendi vin. Tremeta rigardo, mispaŝanta piedo, malĝusta akcento en vorto perfidos vin.

– Tamen, doktoro, ĉe mi estas io pri kio mi ĵuras.

– Kio estas tio, Vamberi?

– Volforto, volforto, doktoro.

– Bone, – diris Bimzenŝtejn, – tial antaŭ la foriro vi vizitu min.

Estis varma suda nokto. La doktoro sidis en sia ĉambro kaj fumis. En la pordon oni frapetis. Li malfermis ĝin, kaj retropaŝis.

– Kiu estas tio? –demandis li.

– Ne timiĝu, efendi, – diris la homo, – mi estas simpla derviŝo Ĥadĵi-Maĥmud-Reŝad, efendi, mi iras al tombo de Bogaeddino.

Kaj Vamberi kun rido ĵetiĝis en la brak-seĝon.

Drapa nigra pinta ĉapo staris sur lia kapo, basko de lia mantelo estis ŝirita. Zono el diverskoloraj ŝnuroj kuntiris lian talion. Sub la zonon estis enigita hakilo kun kurta tenilo. De la brakoj pendis nigraj eroj de longa rozario.

– Do, amiko mia, mi volas fari al vi donaceton.

– Mi atendas, doktoro.

– Ĉi tie estas tri piloloj da striknino. Kiam vi vidos ke ĉio finiĝis, tiuj ĉi globetoj ludos por vi

rolon de lastaj amikoj.

– Dankon, – diris Vamberi, prenante la globetojn kaj forirante.

Ĉe la pordo li haltis, kaj fikse enrigardis vizaĝon de la doktoro:

– Doktoro, mi opinias ke malgraŭ ĉio...

Frapo de la pordo surdigis lian voĉon, kaj deŝiris finon de la frazo.

Bimzenŝtejn ĵetiĝis al la pordo, kaj puŝe malfermis ĝin.

Estis neniu. Nur la varma nokto rigardis okulojn de la doktoro.

## Ĉapitro tria

### 1

Tien kaj reen laŭ la karavano veturadis komercistoj. Ili kriis kaj kverelis inter la ŝarĝbestaj pakaĵoj. Post ili veturis skribistoj, kaj registris la transakciojn.

Al oficisto oni prezentis teon dum la moviĝo, kaj al la aristokrata perso oni preparis la nargileon. Li fumis en la selo tiel lerte kvazaŭ li kuŝus sur divano. Same, dum la moviĝo, oni batpunis sklavon. Parto de la batoj trafis la ĉevalon. Karavana histriono staris per la kapo sur la selo, kaj rakontis anekdotojn.

Tiel moviĝis tiu ĉi vaganta bazaro, nomata karavano.

Azenoj, sur kiuj rajdis derviŝoj, ne aŭdacis

kalcitri, kaj iris kun hipokritaj muzeloj. Ĉevaloj de gardistoj baŭmis, kaj sovaĝe turnis la okulojn. Kameloj de komercistoj balancis la kapojn, kvazaŭ kalkuladis profiton.

Derviŝoj aranĝis sin laŭeble. Iuj sidis sur la pakaĵoj, tenante en la manoj botelojn kun sankta akvo el Mekko. La boteloj estis produktitaj en Eŭropo, do eĉ tuŝo je ili faris islamanon malpura, sed ili ne pensis pri tio. Iuj iris piede, iuj rajdis sur propraj azenoj.

Ĉiuj tiuj ĉi derviŝoj estis friponoj. Al unu el ili, dum pugnobatalo, kiun spektis Vamberi, oni elbatis du dentojn, sed kiam piaj persoj demandis lin dum la vojo kie li perdis ilin, li rerspondis:

– Ĉe monto Ogod, dum batalo kontraŭ malfideluloj, la profeto perdis du antaŭajn dentojn. Ĉu mi povis ne imiti Lin?

Kaj la aŭskultantoj donis al li monon.

Al ili venis homoj kun malsanaj okuloj, kaj petis helpon. Derviŝoj, preninte donacojn, ŝutis en iliajn okulojn malpuran teron, kvazaŭ devenatan el Mekko. Kiam tuta tero el la saketoj, pendantaj sur kolo de ĉiu derviŝo, elĉerpiĝis, ili plenigis la saketojn per nova tero, kiun ili prenis sur ajna haltejo.

Vamberi mordpremis la lipojn, kaj murmuris malbenojn.

Dum haltoj en loĝlokoj la lokuloj sternis tukojn sur la teron, kaj elportis pladojn kun



manĝaĵoj. Oni enŝovis la malpurajn manojn en la viandon, rizon, kaj kaptis kiom eblis. Dezirante montri estimon al la kamarado oni buligis pecojn da graso, kaj proponis kun smajlo.

Vamberi preskaŭ misglutis, sed manĝis. Ĉiutage al li estis pli kaj pli malfacile.

Polva, netondita, laca, li rigardis kaj memorfiksitis ĉion okazantan antaŭ li. Mondo, nekonata al eŭropano, lasis lin en siajn posedejojn.

Li spektis nekutimaĵojn. Jen dekjaraĝa perso estras propran grupon. Lia poŝhorloĝo estas ŝuitita per rubenoj, kaj en silka saketo, sur la brusto, pendas lia stampilo, anstataŭanta subskribon. Li tenas vipon, kaj alpelas servantojn kaj bestojn. Li prononcas malbenojn kaj preĝojn kiel adolto. La servantoj ne kuraĝas levi sur lin la okulojn. Li gvidas karavanon kun sezama oleo.

«Tiel elkreskas despotoj» – pensas Vamberi.

## 2

Vamberi konis jam ĉiujn siajn kamaradojn-derviŝojn laŭnome. Ankaŭ ili sciis, ke li iras na Buĥara, en urbon, pri kiu profeto diris ke ĉie de ĉielo videblas kiel lumo malleviĝas sur urbojn, kaj nur de Buĥara lumo kiel kolono enstaras ĉielon.

Derviŝoj batis sin per vipoj, por havi vundojn sur ŝultroj kaj brusto. Ili gajnis monon per ili, montrante en urboj. Ili infektis tranĉetojn sur la

frunto, por aperu okpinta ulcero. Por tio oni donis precipe malavare, ĉar tio signifis ke la homo estas fervora preĝanto, kaj, preĝante, premas la frunton al okpinta briko.

Tio tute ne ridigis na Vamberi. Inter tiuj ĉi duonfrenezaj kanajloj kaj frenezumantoj estis malfacile simuli indiferecon. Do li kantis suraĵojn el Korano, kaj kaptis sin je la kapo, kvazaŭ volis deŝiri la harojn, nazparoladis same al ili, kaj suprenlevis la okulglobojn. Li havis naturan talenton de imitado.

En Meŝhed ĉiuj iris viziti moskeon de Imam-Riza. Orizita kupolo de la moskeo radiis sur fono de la blua ĉielo. La muroj brilis per la emajlo. Amasoj da malkleraj analfabetaj homoj, premi-taj per tiu ĉi peza riĉaĵo, ploris kaj kriegis, avide sekvante vortojn de la mulaĵoj.

Por lego de preĝoj oni devis pagi monon. Unu analfabeta avarulo alvenis na Vamberi.

– Frato, – diris li, – mi ne havas monon, legu por mi la preĝojn, kaj mi, de malantaŭe, ripetados ilin.

Vamberi prenis la pozon, kaj konscience legis al li la arabajn versaĵojn.

Subite li ekaŭdis ke voĉo post lia dorso diras ŝajne ne preĝon. Li haltis kaj fiksaŭskultis.

– Via ĉevalaĉo kostas ne pli ol kvin dukatoj.

– Mi ĵuras per sankta Abaso, vi friponas. Mi mem pagis por ĝi la dek-duon.

– Ne mensogu, ne mensogu kara mia...

Vamberi returnis kun simula kolero, mal-facile subpremante la ridon.

– Ho, ho, – kriis la avarulo, – ni iom deflankiĝis de la preĝado!

Tiel, iom deflankiĝante, preĝis ankaŭ aliaj pilgrimoj ĉe tombo de la imamo.

...Persio finiĝis per domo ĉe longa ponto trans malvarman riveron kun nekomprene nomo.

Konsisto de la karavano ŝanĝiĝis. Aliĝis afganoj kaj homoj el Hindio.

Vamberi faviĝis. Lin turmentis insektoj. Ili estis ĝis tiom multaj, ke faldoj de la vestaĵoj moviĝis kvazaŭ vivaj.

La vestaĵojn oni sternis sur varmegan cindron, kaj ili krakis kiel bastono. Se forestis fajro, oni ĵetis la vestaĵojn sur varmegan sablon, kaj ĉiuj insektoj elrampis supren. Se estis nek fajro nek varmega sablo, oni serĉis formikejon. Formikoj formanĝis la pedikojn radikale. Buĥaraj azenoj sur la noktejoj kriis kiel diabloj. Ili kriis kvazaŭ oni verŝis sur ilin varmegan peĉon. Ĉevaloj ĵetiĝis flanken de la kameloj, ĉar kameloj manĝis firmajn pikajn kreskaĵojn kaj, ricevante ne sufiĉe da akvo, odoris kiel pestiĝintaj.

La homoj sidis grupe ĉe la fajroj kaj konversaciis.

Persoj fanfaronis per siaj botoj, sur plandoj

de kiuj estis skribita nomo de Omar. Ili volis konstante treti sian malamikon.

Hindoj tenis sin aparte. Ili estis adorantoj de hindia Dio Viŝnu, kaj antaŭnokte metis ĉirkaŭ si kaj siaj pakaĵoj negrandajn bastonetojn, kunigitajn per ŝnureto. Ili opiniis ke nun ili estas bariataj de ĉiuj, do ne malpuriĝos.

Afganoj montris noĉojn sur teniloj de la ponardoj, kaj sur kolboj de la fusiloj. Ĉiuj povis vidi kiom da malamikoj ili neniigis.

Derviŝoj dancis ronde, kriaĉis, petis almozon. Oni ĵetis al ili restaĵojn de manĝaĵoj, kaj kuprajn monerojn.

Vamberi sentis ke li freneziĝas.

Kiam ĉiuj endormiĝis, li komencis trejni sin. Li memorfiksis vizaĝesprimojn de siaj kunuloj, iliajn smajlojn, iliajn grimacojn kaj gestojn. Ĉiunokte li lernis imiti ilin. Post du monatoj li ekestis nedistingebla de aliaj. Ekstere li dissolviĝis en la karavano.

Ĉiuj opiniis lin instruita derviŝo, iranta na Buĥara. Iam liajn ŝultrojn premis angoro. La manoj komencis tremi. La rido sonis false.

«Ĉu vere», – pensis li, – «mi ne revenos?».

Kaj li denove ĉirkaŭrigardis. Flavaj rokoj amasiĝis antaŭ li. Polvaj arbustoj eliris el la fendoj. Elkuris larĝaj lacertoj.

Poste antaŭ la karavano malfermiĝis sabloj. Ili iris ĉiudirekten, kaj finiĝis nenie. Aperis nomadoj. Ĉe ili ne eblis distingi virojn de inoj. Sur

tiuj kaj aliaj estis samaj pufpantalonoj, jakoj kaj ĉemizoj. Kaj tiuj kaj la aliaj kovris la vizaĝojn de la sablo. Iliaj piedoj similis kolbasojn el tolo. Hundoj ĉe ili estis aparte honorataj. Se oni demandis nomadon: «Ĉu vi vendos la edzinon?» li nur koleretis; sed se oni demandis: «Ĉu vi vendos la hundon?» – la nomado ĵetiĝis sur la ofendanton kun la tranĉilo. Tio estis sanga ofendo.

Post Vamberi iris famo de sankta haĝulo de Okcidento. Li dancis kiel neniuj, kaj deklamis en la haltejoj longajn, sonorajn poemojn. Ĉiuj aŭskultis lin kun estimego.

Turkmenoj kun oreloj, flankiĝintaj pro la ŝafaj ĉapoj, kun strabaj okuloj, desaltis de siaj etaj fortaj ĉevaloj, kaj sidis antaŭ li, petante benon aŭ permeson tuŝi lian veston.

Vamberi rigardis iliajn vastajn ruĝajn fruntojn, aŭdis ilian strangan dialekton, sed aŭdacis enskribi nenion. Li nur rigardis kaj aŭskultis.

Tago post tago li nur rigardis kaj aŭskultis. Li ekestis spongo, kiu ensorbas ĉirkaŭaĵojn kiel akvon. Li opiniis ke li aŭ memorfiksos nenion, aŭ lia kapo krevos pro multeco da pensoj.

La nomadoj tuŝis lian veston, lian zonon, kaj interflustris. Ili alkondukis la edzinojn kaj la infanojn, kaj tiuj falis surteren antaŭ Vamberi, kaj etendis al li la manojn. Se ili eksciis ke li estas mensogulo, ili ensabligus lin vivan.

### 3

Foje amason da ili dispuŝis maljunulo, kapo de kiu similis hakitan brasikon. La karavano jam foriris tiel malproksimen, ke ĉirkaŭe estis nur sablo kaj ĉielo. Tutan sian vivon la maljunulo okupiĝis pri raboj kaj murdoj. Ĉiuj eksilentis. Li etendis sian tendenecan, preskaŭ nigran manon, kaj ekparolis.

– *Ŝejkim* (mia ŝejko), kial vi ne komencu grandan aferon? Vi estas sankta homo, – vi povas ĉion. Ataku ni Persojn. Ĉe mi estas kvin mil bravuloj-rajdantoj. Benu ilin per volo de Alaho, kaj ili sekvos vin. Pripensu, ŝejkim.

Vamberi ne ridis. Li pensis. Li pensis pri tio ke Persio estas almoza, ruinigita lando, pri tio ke armeo de ŝaho diskuros kiel ŝafaro, pri tio ke eŭropaj aventuristoj en Teheran subtenos lin, ke la turkmenoj forprenos de persaj vilaĝanoj ties lastan havaĵon, kaj forbruligos la kampojn. Sed kio poste?

Li pensis, kaj ĉiuj rigardis lin. La suno subiris post iliaj dorsoj kiel ega rado de milito.

Vamberi turnis la vizaĝon al la maljunulo. En liaj manoj estis vivo kaj morto de miloj da homoj. Mizera knabo, mortanta pro malsato en Hungario povis nun ĵeti popolon sur popolon. Liaj okuloj brilis.

– Mi aŭskultis vin, *ŝejko*, aŭskultu ankaŭ vi

min.

La maljunulo klinis sian multcikatron kapon.

– *Ŝejko*, ĝis mi finos la promesitan al Alaho vojaĝon en sanktan Buĥara, mi ne povas komenci alian aferon. Atendu.

– Mi atentos, – respondis la maljunulo, – mi atentos ĝis kiam vi revenos. Volo de sankta homo estas leĝo.

Li leviĝis, trairis vicojn da homoj, ĉesintaj spiri, kaj sursaltis la ĉevalon.

Sur sekvanta haltejo aperis afgano. Nigraj rimenoj de liaj vestaĵoj timigis infanojn. Li paŝis mole, kiel kato. Jam en unua noktejo li lokiĝis apud Vamberi.

– Kvankam ni sidas oblikve, parolu ni rekte. Kio vi estas? – demandis li sen iu ajn esprimo, sed liaj okuloj ekstrabis kiel ĉe vundita akcipitro.

– Mi iras el Istanbululo.

– Por kio vi venis ĉi tien?

– Volo de Alaho movas homojn, – respondis Vamberi, sciante ke li ne scipovas rigardi rekte tiun ĉi homon.

– Ĉu vi iam vidis na *frenĝi*?

– Mi ne rigardas malfidelulojn, frato.

– Ili rigardis min, – kriis la afgano, – montoj falu sur iliajn kapojn! Ili murdis miajn fratojn kaj la patron en Kandahar. Kial vi mallevas la okulojn, derviŝo?

– Se vi scius kiom mi toleris de ili en mia

naskolando, – malrapide diris Vamberi, enrigardante kunkreskitajn brovojn de la afgano, – vi delonge blindiĝus pro la furiozo.

La afgano brue leviĝis, kaj foriris al la fajro.

Sekvontage li alrajdis na Vamberi kaj, puŝante lian azenon per sia ĉevalo, elkriis:

– Kio estas via nomo, derviŝo?

– Mia nomo estas Haĝa-Maĥmud-Reŝad.

– Kaj kiel oni nomis vin antaŭe?

– Antaŭe oni nomis min knabo, poste efendi, kaj nun, frato, mi estas haĝulo.

La afgano smajletis per angulo de la lipoj, kaj baŭmigis la ĉevalon.

Samvespere Vamberi, rigidiĝinte en la preĝo, sed reale aŭskultante, aŭdis ĉion kion diris la afgano al la karavan-estro.

– Karavan-*baŝi*, – diris li, – tio estas rusa spiono. Li pririgardas ĉiujn vojojn, kaj poste venos rusoj. Ili forprenos de ni la edzinojn kaj infanojn. Sed mi ne estas stultulo. En Buĥara estas emiro, kaj la emiro posedas ardan feron por tiuj homoj.

– Ne rapidu, amiko, – respondis la karavan-*baŝi*, – komence vi konvinkiĝu pri tio.

Kaj matene ili venis konvinkiĝi.

Sed Vamberi preĝis. Li staris kiel fosto, kaj liaj okuloj vidis nenion. Li staris kiel ŝtono. Liaj lipoj flustris ion.

La afgano, montrante lin, laŭte ripetis al la karavan-*baŝi* siajn akuzojn.



La karavan-estro rigardis na Vamberi. Vamberi aŭdis ĉion, li sentis ke unu movo de la vizaĝo povas perfidi lin.

Li staris kiel ŝtono. Kaj la karavan-estro forkondukis la afganon, kaj ĝis orelo de Vamberi venis lia flustro:

– Mi ne kredas, – vi eraris, afgano. *Frengoj* ne staras tiel.

#### 4

La afgano ekestis teruro de Vamberi. Li ĝojis al ĉiu bagatelo por tedataki lin. Ekvidinte ĉe Vamberi unu hazardan oran moneron li venis kaj demandis minace:

– Ĉu vi, derviŝo, ne akceptis malriĉecpromeson? Aŭ vi havas specifajn regulojn pri tio?

– Mi havas specifajn regulojn, – diris Vamberi.

– Mi volas scii ilin.

– Sciu. Tio ne estas sekreto. Oro helpas kuraci flavig-malsanon. Mi kuracas ĝin per tiu ĉi monero. Pasintsemajne mi resanigis duopon...

La afgano grincis per la dentoj. Li estis sovaĝa, kiel mont-elstaraĵoj de sia patrolando, kaj ruza per simpla ruzeco. Ĉi tie li sentis sin stultigita. Vamberi ŝajnis al li sorĉisto.

La karavano noktis nun ĉe putoj, en etaj mizeraj arbaretoj inter sablaj altaĵoj. Vamberi ne povis endormiĝi. Li turniĝis per la kubuto,

kaj malvarmeto trakuris lian dorson. Ĝuste kontraŭ li kuŝis la afgano kaj fikse rigardis lin. Sed okuloj liaj estis rondaj kaj flavaj. Li fumis opion, kaj alglutadis teon. Fajreroj el lia pipo lumigis la vizaĝon. Nun li ne estis homo. Li, senfortigita, kuŝis kiel pakaĵo.

Vamberi ektemis pro la neatendita penso. Li elmemoris strikninon. Unu pilolo, ĵetita en la tason da teo, – kaj tiu ĉi homo malaperos. Homo, kiu eble eĉ morgaŭ murdos lin.

Li elprenis la pilolon, kaj tenis ĝin ĉe rando de la taso. La afgano vidis kaj sentis nenion, liaj manoj tremis. Li kuŝis kiel rajd-pakaĵo.

Tiam el post la nuboj eliris juna luno. Ĝiaj radioj falis sur manojn de Vamberi. Bruliga honto frapis liajn tempiojn. Li abrupte retiris la manojn, kaj kaŝis la pilolon.

...Kaj denove tiriĝis la dezertaj dunoj. La varmego mortigis la bestojn. La homoj komencis fali pro sunfrapoj. Tra la karavano vagis febro. Akvo forestis. Vamberi falis. Liaj okuloj eniris en ruĝajn rondojn, turniĝantajn ĉie. Super li saltis derviŝoj, kriis azenoj. Li leviĝetis kaj ekĝemis. La sablo ŝtopis la okulojn kaj orelojn. La varmego sablo ŝutiĝis sur la bruston, kaj brulvundis la manojn. Iu kliniĝis super li, kaj Vamberi eksentis odoron de akvo.

Li kolektis la lastajn fortojn kaj diris:

– Trinki, donu trinki!

Unuafoje dum tiu ĉi tempo li ne memoris ki-

ulingve li diris. Super li staris la afgano kun kruĉo da akvo.

«Kion mi diris?» – pensis Vamberi. – «Tio estas fino».

– Trinku, – diris la afgano, klinante la kruĉon. – En Buĥara vi jam ne trinkos, derviŝo.

Ĉi-momente en la karavano okazis tumulto. Homoj, pakaĵoj kaj bestoj kunmiksiĝis. Preterfajfis du kugloj, du sagoj falis ĉe piedoj de Vamberi. La bruo plifortiĝis.

– Atako! – oni kriis de ĉiuj flankoj, – alterigu la kamelojn!

Apartaj rajdantoj elsaltis el la homamaso, kaj rajdis renkonten al la rabistoj. Post nelonga kunpuŝiĝo oni facile forbatis ilin.

Poste ĉiuj ekstaris ronde. Ene de la rondo oni metis triopon da mortigitoj.

Vamberi venis kun amaso da derviŝoj. Rekte kontraŭ li kuŝis la afgano. Strio da sango fluis el lia buŝo. Vamberi deturniĝis.

Post semajno la karavano eniris na Buĥara.

## 5

Vamberi sidis sur tapiŝo en unu el karavanejoj de Buĥara, ĉe palaca placo Registan, kaj rigardis ĉion per la lacaj okuloj. La celo ekestis atingita. Ĉion malpermesatan oni povis tuŝi. Li vidis palacon de emiro, dek unu pordojn de Buĥara, fermitajn por eŭropanoj, kanalon Ŝaĥrud kun verda akvo, kiu trairis la urbon, na

Meĝid-Kajan – moskeon kun blua kapo kaj verdaj muroj.

Jen estas Mirĥarab: turo el bakitaj brikoj, de kiu oni deĵetas krimulojn. Lin oni ne deĵetis. Jen korto de torturoj, kie li ne estis torturata, jen sklav-bazaro, kie li ne estis vendita.

Ĉiuj ĉirkaŭantaj lin homoj opiniis lin samulo. Antaŭ li ili okupiĝis pri siaj kutimaj aferoj: ĉe buĉisto rostiĝis viando, publik-skribisto skribis am-leteron kiun diktis al li envolvita virino, barbiro kraĉis sur vangojn de la kliento, deskuante de la fingroj la sapan ŝaŭmon sur dorson de strata hundo, armil-vendisto frapadis la klingon, kriante pri bonaj kvalitoj de la sabro. Ĉio turniĝis kiel rado, faranta samajn turnojn.

Ĉi-nokte Vamberi sonĝis ke li, estante knabo, sidas sur neuzita tereno en Duna-Serdageli, kaj antaŭ li – unupieda invalido. Invalido diras al li: «Hej, ĉu vi volas koni ĉiujn lingvojn – tio estas nemalbone!»

Vamberi vizitis scienciston. La sciencisto akceptis lin kiel fraton. Li donis al li teon kaj pipon kun plej bona tabako.

– Trinku multe, haĝulo, – rekomendis li, – kaj fumu multe. Teo larĝigas niajn sangokanalojn, kaj maldensigas la sangon, kaj tabako freŝigas la cerbon.

La sciencisto mem ne fumis. Ĉe li, sur la zono, pendis eta kukurbo, ŝtopita per brun-flava tabako. Li enigis en ĝin la fingrojn, prenis la

tabakon, enŝovis ĝin en la buŝon inter la lango kaj la palato, kaj poste elkraĉis. La tabakaj gutetoj flugis en vizaĝon de Vamberi, sed li ne rimarkis ilin.

Li tenis en la manoj manuskriptojn, valoregajn flaviĝintajn foliojn, plenigitajn per nigraj kaj ruĝaj literoj, kurbiĝantaj kiel katoj kaj birdoj. Tiajn manuskriptojn havis neniu en Eŭropo.

– Haĝulo, – diris la sciencisto, elkraĉante la tabakon trans ŝultron de Vamberi, – ĉu vi tre ŝatas librojn?

– Jes, tre.

– Ankaŭ mi: ili estas tute vivaj, haĝulo. Krom tio ili scias ĉion. Ĉu vi ankoraŭfoje venos al ni, haĝulo?

– Mi venos, – respondis Vamberi, – eĉ kelkfoje mi venos.

– Tial alportu el Istanbul iujn librojn. Alportu al mi verkojn de Saadeddin, kaj de aliaj, haĝulo.

Vamberi elmemoris ke antaŭ forveturo en Persion unu doktoro petis lin alporti el Azio kelkajn kraniojn de tataroj, por kompari ilin kun la hungaraj, kaj kiel oni refutis:

«Pli bone ni deziru al nia amiko revenigi nedifektite la propran kranion».

Vamberi elmemoris tion kaj smajlis.

– Mi alportos, – diris li.

– Ĉu ŝatas la haĝulo versaĵojn? – esploris la sciencisto.

– Pli ol lumon de tago, – respondis Vamberi.  
– Tio bonas. Ja estas dirite ĉe Hafiz: kontraŭ unu naskmakuleto de belulino oni povas fordoni du persajn urbojn. Tio estas tre trafe, haĝulo.

Kaj li, pro ekscesa tabako, komencis tusi.

## 6

Poste Vamberi estis ĉe tombo de Bogaeddin, kaj saltdancis kaj kriis kun la derviŝoj ĝis la mateno. Kiel liaj piedoj eltenis tiun ĉi dancadon, li eĉ mem ne sciis. Sed mortdanĝero estis ĉi tie pli proksima ol ie ajn.

Li vidis emiron, dikan oran pupon. La emiro apogis sin sur la sabron, kaj skuis la barbon.

Antaŭ la akcepto ĉe la emiro unu el ties korteganoj prenis na Vamberi je la nuko kaj diris flanken:

– Domaĝas ke hodiaŭ mi forgesis hejme mian tranĉilon.

Kion li volis diri per tio, Vamberi eksciis neniam. Li staris kiel arbo. Oni povis tranĉi lin, kaj li ne ekkrius.

Li vidis ĝardenojn de Samarkand, kaj verdan ŝtonon de Timur la lama.

Poste li foriris el Buĥara. Antaŭ eniri la dezerton oni faris orakolaĵon el bastonoj kaj ŝtonoj, kaj divenadis per ĝi. Interpreto de Vamberi estis plej bona. Oni prezentis donacojn al li.

Sed kiam la karavanon ĉirkaŭigis teruraj

sabloj de Adam-Kriglan, kio signifas: loko kie pereis homo, kie ene de vastegaj dunoj, disrompitaj per tempestoj, blankiĝis ostoj, – Vamberi tuj gajiĝis.

Kun ĉiu paŝo reen li sentis malstreĉiĝon. Sur la haltejoj li observis strangan vivon. Riĉa turkmeno sidis kun vaste malfermita buŝo. Lia sklavo enspiris fumon de fortikega tabako kaj, entenante plej akutan parton de la fumo, per la plena brusto enblovis la restaĵon en gorĝon de sia mastro. Tio estis sovaĝe kaj ridinde. Iam la sklavo ruzis, kaj la turkmeno ricevis signifan porcion da veneno. Tiam liaj okuloj elstreĉiĝis, kaj li kaptis la skurĝon.

Vamberi trinkis teon, spicitan per ŝafa graso kaj salo, kaj ĝi tre plaĉis al li post malfacila marŝado.

Li vidis homojn kiuj lavas sin per sablo, kaj mem faris tion. Neniu povas diri ke li konatiĝis kun Azio ĉe skribotablo. Li estis saturita per ĝi, kiel liaj vestaĵoj – per odoro de kamelo.

## Ĉapitro kvara

### 1

Komenciĝis Afganio. Tiriĝis nudaj rokoj kaj nigraj intermontoj. En Afganio stato de derviŝoj estis malbona. Afganaj paŝtistoj en tolaj manteloj, kun longaj fusiloj anstataŭ irbastonoj, kaj komercistoj, portantaj sur si plenan arsenalon,

agnoskis nenian piecon. Ili malice ridis kaj ĵetis ŝtonojn.

Ĉirkaŭ la karavano svarmis spionoj. Vamberi aparte ne plaĉis al ili. Ili kaŝe postiris lin kaj, se li malkovris ilin, atakis kaj batis lin. Estis preskaŭ nenio por manĝi. Malvarmo penetris ĝis la ostoj. Vamberi rememoris la junecon, straton Tri Tamburoj, kaj striktigis la zonon.

Dum unu malvarma tago ili venis en Gerat. «Urbo de cent miloj da ĝardenoj» trinkigis lin per akvo plej bona en azio. En la ĝardenoj oni povis manĝi fruktojn laŭdezire. La vizitantojn oni pesis dum eniro kaj eliro. Pagon oni prenis laŭ diferenco en la pezo.

Jakub-ĥano, filo de afgana emiro, sidis en sia palaco, kaj rigardis placon, kie okazis parado. Ĉe lia fenestro mem ludis muzikistoj. Amaso da derviŝoj staris en siaj ĉifonaĵoj iom flanke. Inter ili estis homo kun sovaĝa kaj obstina vizaĝo. Li movis, laŭtakte, la piedon.

– Tio estas eŭropano, – diris Jakub-ĥano, – neniu en Azio faras tion, aŭskultante muzikon.

Kaj li vokis lin al si.

Kaj li longe konversaciis kun Vamberi pri diversaj sanktaj lokoj, pri scienco de derviŝoj, pri Afganio, kie estas abeloj, sed forestas mielo; poste li tuŝis per la mano ŝultron de Vamberi, kaj diris, mallaŭtiginte la voĉon:

– Vi estas instruito, haĝulo. Vi estas pli instruita ol iu ajn haĝulo el kiuj mi vidis. Vi estas



*frenĝi.*

Vamberi komprenis ke li estas travidebla por tiu ĉi homo.

Restis nenio por fari, sed li diris:

– Ne.

Jakub-ĥano kliniĝis malantaŭen, kaj enpen-siĝis.

– Ne – estu tiel. Mi ne volas pereigi vin. Iru pace. Mi eraris.

Vamberi ne memoris kiel li eliris el la pala-co, kiel li foriris el Gerat.

Li malvarmis dum noktoj, kaj afganoj ne kaŝis la malican ĝojon. Nun li similis malpuran sakon en kiu frapis ostoj. Foje li leviĝis en la selo, kaj ekridis. Li ridis sensone, kaj skuiĝis tutkorpe. Antaŭ li estis malhelaj argilaj muroj de Meŝhed. Li revenis en Persion.

## 2

Veturante sur vojoj de Persio Vamberi sentis sin denove naskita; ĉi tie li povis rektiĝi, paroli per iu ajn voĉo, manĝi kion li deziras. Li laŭte ekkantis gajan italan kanton.

Uzbeko, lia kunvojaĝanto, estis mirigita per tiu ĉi nekutima ŝanĝo. La derviŝo de okcidento antaŭ liaj okuloj mem ekestis alia homo. Al la simpla nomado estis tre agrable tiu ĉi heliĝo. Ĉiuj homoj ŝatas ĝojon.

– Vi parolas mirindan lingvon, derviŝo, – diris li, – mi komprenas eĉ ne vorton. Sed tio

estas lingvo de anĝeloj. Ĉu tio estas preĝoj?

– Certe preĝoj, – respondis Vamberi, – tio estas specifaj preĝoj por bona okazo. Alkantu, kaj vi proksimigos savon de via animo.

La kantoj iĝis pli kaj pli frivolaj. La uzbeko alkantis laŭeble. Li ekestis kovrita per ŝvito, sed ne volis preterlasi okazon preĝi per la mirinda lingvo.

En unu el la lokoj, vekiĝinte matene, ili ekaŭdis monotonan sonon de trumpeto.

– Kio estas tio? – demandis la uzbeko, ne konanta Persion.

– Tio estas voko en banejon, – diris Vamberi. – Iru ni.

Ili iris en banejon. Antaŭ la banejo kuŝaĉis ĉevalaj fekaĵoj. Muroj de la senvestiĝejo estis pentritaj pri bataloj laŭ eposo far Firdusi, kaj ĉirkaŭe kuŝis malpuraj vestaĵoj. En najbara ejo ili trovis etan basenon plenan per varma akvo, kie sidis dek personoj samtempe. Vamberi lavis sin, kaj ĝojis al la varma akvo kiel infano. En tria ĉambro oni proponis al ili koloriĝi per henao. Per tiu ĉi farbo oni farbis barbon, plandojn kaj ungojn, kaj ili iĝis ruĝaj. Elirinte el la banejo Vamberi laŭte ridis.

– Pri kio vi ridas? – demandis la uzbeko.

– Mi ridas pri saĝeco. Vi ja scias, uzbeko, ke derviŝoj devas teni sin hunde: ĉiam malsati, kontentiĝi per plej maloportunaj lokoj, pasigi noktojn sendorme...

– Mi ne sciis tion, – diris la uzbeko.

– Kaj ĉion ĉi tion mi ĝis nun faris: mi estis bona malpura hundo. Kaj nun, al diablo, mi revenis en homan felon, amiko mia, – finis li hungare.

Poste ili eniris lernejon. Vidinte la derviŝon la etuloj ĉirkaŭiris lin.

– Ĉu vi konas geografion?

– Ni konas, – respondis ili.

– Do diru, kiom da tempo oni bezonas por ĉirkaŭiri tutan teron?

– Kvindek kvin jarojn, – ĥore respondis ili.

– Sur kio staras tero? – demandis li.

– Sur anĝelo.

– Kaj la anĝelo sur kio?

– Sur fiŝo.

– Kaj fiŝo sur kio?

Ĉi tie neniu el ili povis respondi. Sed unu kriis:

– Mi scias! La fiŝo denove staras sur anĝelo.

En alia urbo Vamberi ekvidis ĉe la karavanejo eŭropanon-vojaĝanton.

Li estis vestita perfekte, kaj brilis kiel nova fingringo. Svedlingve li eligis tre fortajn vortojn:

– Kiel diri al tiuj ĉi azenoj ke ili maldece pakis mian bagaĝon?

La konfuzitaj persoj silentis, ne komprenante kion li volas de ili.

Vamberi venis al la eŭropano, kaj diris

svede:

– Vi eraras, sinjoro, tiu ĉi maniero de pakado estas plej bona. Ĝi enkalkulas milon kaj iom da jaroj, kaj estas pruvita per la uzado.

La svedo, pro la miro, forgesis fermi la buŝon.

Finfine li elbalbutis:

– Kio vi estas?

– Mi estas derviŝo, sinjoro, kaj ne pli ol tio. Tamen mi konas ĉiujn lingvojn de mondo.

Kaj li citis al la svedo du versaĵojn el sagao pri Fritjof.

La svedo desaltis de li pro la teruro.

– Ĉu vi vidas nun, – diris Vamberi al la uzbeko, Alaho donas al derviŝoj majestatan potencon de vorto.

– Mi vidas, – diris la uzbeko, – sed Alaho troviĝas tre alte, kaj ni – ne. Do veturu ni pluen, derviŝo.

Tiel ili atingis, post monato, na Teheran.

### 3

Magra, nigra kiel karbo, multhara, kun cikatroj sur la brakoj kaj gamboj, Vamberi eniris la turkan ambasadejon.

La amikoj ĉirkaŭis lin kun miro kaj ĝojo. Okazis tumulto. La homoj enbrakigis lin kaj demandis pri la vojaĝo; scivoluloj interpuŝiĝis, por eĉ per unu okulo rigardi homon kiu heroece trairis tiom da mil-kilometroj tra neloĝataj

lokoj. Oni proponis al li monon kaj amikecon. Vamberi estis heroo de la urbo. Eŭropanoj aranĝis paradajn tagmanĝojn je lia honoro. Tutan monaton Vamberi ne tagmanĝis hejme.

Antaŭ forveturo en Eŭropon li eniris viziti na Hajdar-efendi.

Ili konversaciis ĝis post la noktomezo. La turko demandis lin:

– Kaj nun, Vamberi, diru: ĉu vi trovis tion kion vi serĉis?

– Ne, – respondis Vamberi, – mi ne trovis, kaj nun mi diros kial. De infaneco mi volis koni kiom eble pli da lingvoj kaj homoj. Mi ekkonis. Mi volis trovi en Azio antikvajn hungarojn, legendo pri kiuj vivas en Hungario. Mi serĉis sed ne trovis ilin. Kion fari! Neniu pagos al mi pro miaj suferoj kaj grizaj haroj. Sed mi havas animon de esploristo.

– Kaj kial, Vamberi, vi revenis viva, ĉu vi pensis pri tio?

– Mi pensis, – diris Vamberi. – Mi revenis viva ĉar al la sovaĝaj popoloj, kiuj kutimas vidi tranĉilon en mano eĉ de sia amiko, mi ekiris kun pura koro. Se mi ruzus pro la profitemo, kaj vere spionus, oni kaptus min. Sed mi povis rigardi en okulojn de tiuj homoj, kaj en tio estis mia forto.

– Nun vi vidis kaj Orienton kaj Okcidenton. Kio estas ili?

– Mi diros al vi. Mi amis Azion delonge kaj

demalproksime. Eble pro tio ke mi malbone vivis hejme. Sed ju pli profunden mi eniris Azion, des pli da monotoneco kaj maldiligentemo mi trovis tie. Tio en Turkio kaj Persio. Centra Azio estas pli aĝa ol ili je okcent jaroj. Kaj Centra Azio estas kripto. Mi ĝojis elŝiriĝi de tie. Tie regas sklaveco kaj despoteco. Mizero kaj dezerto. Atendu ni pli bonan tempon. Okcidento estas plena per homoj ruzaj kaj fortaj. Ili ŝatas oron kaj sangon eĉ pli ol azianoj. Kaj ili jam iras. Angloj okupis na Kandahar, rusoj proksimiĝas al Ĥiva. Iam ili renkontiĝos. Mi opinias ke post cent jaroj oni povos pertrajne viziti la urbojn, kie mi tremis pro la morttimo. Mi iros dormi, efendi.

...Antaŭ la forveturo Vamberi venis al doktoro Bimzenŝtejn.

– Doktoro, – diris li, starante en apoteko de Bimzenŝtejn, – mi devas redoni al vi vian donacon.

Kaj li etendis al Bimzenŝtejn la tri pilolojn de striknino.

– Elmemoru, bonvolu elmemori kion vi volis diri kiam vi venis al mi nokte, antaŭ la vojaĝo, – kriis la doktoro, – mi ne aŭdis finon de la frazo.

– Mi povas fini ĝin nun, kaj estu tio ĝustaloke. Mi kriis al vi tiam: Doktoro, mi opinias ke vivo, malgraŭ ĉio, estas bona afero!